Péter Péter
2600 Vác
Kárász u. 1.
Tel.: (27) 313-661
Mob.: 06-30/544-5747
Email: petergabo@freemail.hu

Péter Péter
(Petro Vacano)

Verkoj de Vacano

ENHAVO

LUMO KAJ OMBRO

LA LASTA RONDO
ONI DIRAS, KE...
MONOLOGO
AL EDZINO MIA
LA OKULOJ ŜTELITAJ
POST HEJMA BULIO
KIEL LUMON LA FLOR'
MEMKONFESO
BONE KOMBITAJ MURDISTOJ
OBSEDULOJ DE L' MASAKRO
DORMU NUR!
MIRAKLON NE ATENDU!
SOLA
PREĜO PAGANA
NE AŬDU!
EN ĜARDENO DE L' DIO
DUONVOJE
DU OPINIOJ
MALMULTA ESTAS ANKORAŬ LA LUMO
AMA VERSAĴO
SENESPERE
AMARECO
KUN LEVITA KAPO
VOJO DE L' GRIZULOJ
FOJE SOMERO ESTIS
REPAGULUM
NENIU DEMANDU PLU...
LUMO KAJ OMBRO
POST DEK JAROJ
PEJZAĜO DE L' XX-a JARCENTO
MIA PATRINO
HEREDAĴO
HIPOTEZO
NOVAN!
ION GRANDIOZAN FARI!
DEKSEP JARA ESTIS LA KNABINO...
XX. JARCENTA PETEGO
KREPUSKO EN VÁC
ANTAŬTAGMEZ' PRINTEMPA
EN PARKO DE DEÁKVÁR

TRADUKOJ

Ady Endre: SONĜO DE PAŬL VERLAINE
Ady Endre: SUR BORDO DE L' MARO BLUA
K. Simonov: ATENDU MIN
Vinokurov: FORGESIS NI LONGE...
Apollinaire: KOLĈIKOJ
Ady Endre: PLORI, PLORI, PLORI
Paŭl Verlaine: AŬTUNA KANZONO

FÉNY ÉS ÁRNYÉK

AZ UTOLSÓ MENET
La lasta rondo
AZT MONDJÁK...
Oni diras, ke...
MONOLÓG
Monologo
FELESÉGEMNEK
Al mia edzino
AZ ELLOPOTT SZEMEK
La okuloj ŝtelitaj
HAJNAL FELÉ
Post hejma bulio
MIKÉNT NÖVÉNY A FÉNYT
Kiel lumon la flor'
ÖNVALLOMÁS
Memkonfeso
JÓL FÉSÜLT GYILKOSOK
Bone kombitaj murdistoj
MARS ISTEN FOGLYAI
Obseditoj de l' masakro
ALUDJ!
Dormu nur!
NE VÁRJ CSODÁT!
Miraklon ne atendu!
ÚJRA EGYEDÜL
Sola
POGÁNY IMÁDSÁG
Preĝo pagana
NE HALLD MEG!
Ne aŭdu!
AZ ISTEN KERTJÉBEN
En ĝardeno de l' Dio
FÉLÚTON
Duonvoje
KÉT VÉLEMÉNY
Du opinioj

MÉG KEVÉS A FÉNY!
Malmulta estas ankoraŭ la lumo
SZERELMES VERS
Ama versaĵo
REMÉNYTELENÜL
Senespere
KESERGŐ
Amareco
EMELT FŐVEL
Kun levita kapo
A SZÜRKÉK ÚTJA
Vojo de l' grizuloj
EGYSZER NYÁR VOLT...
Foje somero estis
REPAGULUM
Repagulum
NE KÉRDEZZE SENKI!
Neniu demandu plu
FÉNY ÉS ÁRNYÉK
Lumo kaj ombro
TÍZ ÉV UTÁN
Post dek jaroj
XX. SZÁZADI TÁJKÉP
Pejzaĝo de XX-a jarcento
ANYÁM
Mia patrino
HAGYATÉK
Heredaĵo
HIPOTÉZIS
Hipotezo
ÚJAT!
Novan!
DE SOKAN KÉSZÜLÜNK
Ion grandiozan fari!
TIZENHÉT ÉVES VOLT A LÁNY
Deksep jara estis la knabino...
XX. SZÁZADI ZSOLOZSMA
XX. jarcenta petego
VÁCI ALKONYAT
Krepusko en Vác
TAVASZI DÉLELŐTT EGY DEÁKVÁRI PARKBAN
Antaŭtagmez' printempa en parko de Deákvár

NOVELOJ

Fragmento de taglibro
Kristnaska antaŭludo
La ĉevalo kaj mi



LUMO KAJ OMBRO

poemoj kaj tradukoj

Asocio Jozefo Kármán

Mi dediĉas ĉi tiun verkon al
Johano Sárközi,
ĉi-maniere dankante lian amikan helpon

Mi dankas al
S-ro Tibor Papp,
al ĉefredaktoro de
Debrecena Bulteno,
lian utilan fakan konsilon kaj helpon.

Anstataŭ antaŭparolo:

Kara Petro!

Ĝis nun kiel bohemon mi konis vin, kiun seriozaj aferoj ne interesas; kaj jen, poemkolektaĵo via, plene da profundaj pensoj; meditado pri la sorto de la homaro, de la mondo, kaj pri la sekretoj de la homa animo.

Koncerne la formon de la poemoj - pri poezio mi estas ne kompetenta - prijuĝi ĝin mi ne povis.

Ili ĝenerale estas faĉile kompreneblaj kaj ĝueblaj.

Sincere mi gratulas al Vi!

Nepre eldonigu ilin!

Amike:
Johano Sárközi

La 09-an de Aŭgusto 2000

Kelkaj vortoj pri Petro Vacano

Lia originala nomo estas Péter Péter. Li naskiĝis la 10-an de februaro 1937 en Vác. Lia parencaro estas multnacieca kaj multlingva, tial ankaŭ li parolas plurajn lingvojn. Lia edzino laboris en la sanitara sekcio. Li havas du filojn. Lia pli aĝa filo laboris en Gernanio. Lia faka kvalifiko estas uzina inĝeniero, produktad-teknologio. Nuntempe li estas emerito, lia lasta laborejo estis en la Fakmezlernejo de Informad-Teknika Fako, kie li laboris kiel fakinstruisto.

Jam en lia juneco li ekŝatis la literaturon, ja en lia 14-a jaro li ekverkis poemojn kaj novelojn. Ĉiam li estis ŝatinta okupiĝi pri literaturo, sed bedaŭrinde, por malmultaj estas donite "perverki" la vivbezonaĵojn. En 1964 la "opozicia" Verkista Rondo Miklós Radnóti akceptis lin kiel anon, tio poste estis nuligita pro influo de oficialuloj. En 1968 li debutis. En 1998 li aniĝis ĉe Soĉieto Jozefo Kármán. Pere per liaj verkoj li prezentiĝis jam en gazetoj de lia regiono, kaj en Budapeŝto, en Radio Madách kaj Radio Dunakanyar (Danubkurbiĝo) kaj en Televido ES. Liaj verkoj aperis jam en Napút (Sunvojo), en Magyar Napló (Hungara Taglibro) ktp, kaj en diversaj antologioj. Lastfoje li sukcesis eldoni libron, kies titolo estis Poezio de Danubkurbiĝo, kaj en kiu 26 verkistoj publikis. Li eldonis multajn el siaj verkoj kiel privata eldonisto. Liaj verkoj estis publikitaj ankaŭ en eksterlando (ekz. en Magyar Szó /Hungara Vorto/, en Nov-Zelando). Li kaj liaj poet-amikoj estas invititaj por multaj prezentadoj, eĉ en eksterlando.

Li ekkonis Esperanton jam en lia studentaĝo, tion li enplektis en lia romano "Rekviemo por amo", kiu estas nun ankoraŭ en la eldonejo. Pri Esperanto-literaturo li ekokupiĝis nur post 1982, post sukcesa trapaso en lingvoekzameno antaŭ la komisiono estrata de Alfonz Pechan. Cetere, li legis multe da Esperanto-verkoj, li havas propran Esperanto-libraron. En 2001 li estis la unua ĉe konkuro de tutlanda arta poemtradukado en Esperantlingvo.

Tibor Papp

POEMOJ

LA LASTA RONDO

Foje haltos antaŭ mi
la sort' por batali,
kaj mi povos antaŭ li
ne timante stari.

Venu interbatali!
- nenion perdante
mi brave krios al li
la kapon levante.

Kaj sovaĝe luktos ni
tra l' fosaj', arbusto;
venkos li, malvenkos mi
bele kun honesto.

ONI DIRAS, KE...

Oni diras, ke mi estas frenezulo,
ĉar mi amas sole nur edzinon mian,
rigardante min mem - kiel en spegulo -
en ŝiaj okuloj, trompantaj neniam.

Oni ne renkontis la fidelan amon,
kiu kun ni loĝas en nia gaja dom',
oni ne fidis la teneran miraklon
dirante nur pri mi, ke kompatinda hom'.

Ne mi, ili estas ĉiuj kompatindaj!
Nun mi ridus ilin, sed ilin bedaŭras;
kiuj pri la amo estas surdaj, blindaj,
preter kiuj ĉiam la temp' adiaŭas.

En mia edzino estas kune ĉio:
fidela edzino, konfida amikin',
zorgema patrino de la familio,
kaj finfine la arda, ama amatin'.

MONOLOGO

Vi estas sola lup': muskol' kaj ŝtalo.
Per ungoj kaj dentoj vivtenas vi mem;
ne rompas vin vento, frost' kaj malsato,
sola lup' vi estas: forta kaj liber'.

Vi tra l' nigra nokt' vagadas sole nur,
pro via tirbojo ekkirlas la tim'
disŝire la fridon de la noktvelur',
kiel la silenton la ŝtorm' de l' anim'.

En okuloj viaj flagras la fier',
vi devojigas ĉiujn ombrojn jelpe;
sed maljunece, diru, estos kiel

kiam via korp' surteriĝos feble?
Pro dolor' via eĉ larmgut' ne estos!
Kiel vi vivis: solece vi mortos...

AL EDZINO MIA

Vi apartenas al mi -
    esto mia estas sigel' de via sort'.
Jam vi apartenas al mi
                vole, nevole,
kaj mi scias:
    mi rigardos vin
    ankaŭ tra mia mortotuko
per okuloj de mia fil'...

LA OKULOJ ŜTELITAJ

En riĝardo via marĉlumflamo flagras:
okuloj mortaj de amatino mia
tra viaj okuloj al mi ekbriladas,
veke la frenezon de l' febro estinta.

En rigardo via ardas fremda brilo -
fosforeskas en ĝi fantomlumo verda,
venas mesaĝ' per ĝi nun el trans la vivo
de ŝi, kiu drivas en la spac' eterna.

Kaj kiam la arda lumo ekflamiĝas,
al abismo tiras min la stranga kirlo,
kaj en la sovaĝa plezur' tie estas
la interbrakumo de l' eksamatino:
  delir' ebria, kaj konjektas neniu,
  ke en vi denove reviviĝas iu...

POST HEJMA BULIO

Densa fumo flugas
tra la svena aer',
boteloj rompitaj
kuŝas jam sur la ter'.

Inundas la muzik'
el la magnetofon'
pro ritmo sovaĝa
tremadas la plafon'.

Dancas jam neniu;
en ebria delir'
ni kuŝas sur la sof'
kun lacema dezir'.

Lante jam tagiĝas,
nin vekas aŭror';
falas en l' okulojn
la lumo kun dolor'.

Ankaŭ ŝi ekstaras
por iri al la pord',
kaj ĵetas rideton
ŝi al mi el la kort':

Mi eliras post ŝi,
kaj antaŭ la dom'
vidas mi ke ŝin jam
kisas alia hom'...

KIEL LUMON LA FLOR'

Do mi soifis vin kiel lumon la flor',
igis min surda kaj blinda tiu amo,
kaj diino estis vi per mia ador',
per sankta frenez' en mia okulflamo.

Preĝon kaj psalmon el via nom' mi plektis,
poemriver' estis antaŭ vin verŝita,
la edenopordon por mi vi malfermis,
kaj nun pri l' dolor' mi estas instruita!

Ne preĝon, psalmon, sed punon vi meritas,
vian blankan korpon ekŝiru la skurĝo,
batu vin ĝis kiam la brakoj toleras,
aŭ ekploras en vi la konsci' de l' kulpo!

MEMKONFESO

Mi estas nenio kaj estas neniu,
el la multaj nur sola formiketo
por fari laboron kiel la aliu';
naskiĝis, vivas mi sur la planedo.

Mi estas neniu kaj estas nenio:
al unu' kiel part' mi apartenas;
grav' de labor' mia dependas de tio,
al tiu tuto kiel ĝi kunvenas.

Mi estas formiko, nur punkt' el la multo
- neniu, neni'- jen do mia esto;
mi faras laboron pie en tumulto -
naskiĝis, vivas, mortos sen protesto.

BONE KOMBITAJ MURDISTOJ

Ridetantaj murdistoj afablaj
en la nomo de l' pac' kaj demokratio
direktas, venenas sorton nian
ne en elektra sed prezidanta seĝo.

Honorpodio kaj pacparolo;
por novaj raketoj: novaj miliardoj;
do atendu nur en la malsatzon'
la vegetanta ar' je iaj mirakloj!

Ho, kiel diboĉas en Libanon'
la pac', kiel la ord' en Nikaragvo,
en Salvador' aŭ Mezorient', kaj
heroaj' grenada trans la granda akvo!

Vasta arzenalo de kemiaj
armiloj, neŭtronbomb', flugilaj raketoj,
la "rajto de atomfrap' unua"
nepre servas ja la sanktaj pacaferoj!

Fabelu, bravuloj ridaĉantaj
de l' kosmomilitaj frenezaj kimeroj
pri la "homaj rajtoj", pri la paco,
vi, novaj stalinoj kaj novaj hitleroj!

Sed ni kredas, ke la frenezuloj,
sidantaj ĉe flanko de l' malbenata mort',
je la venk' de l' naŭz' kaj sobra menso
finos siajn sortojn sur sterkej' de la mond'!

OBSEDULOJ DE L' MASAKRO

La dolor' de nenia di'
povis savi ankoraŭ
nian malbenan planedaĉon,
frenezitan pro militaj svenoj
- la naciojn de l' Tero
la dioj ne povis
savi vere!
    Prometeo vane stelis
    la fajron por ni,
    kaj oni vane krucumis Jesuon:
sigelo de Kain tie karbiĝas
sur nia frunto obstina!
... Ni vadas en koto nigra de l' malamo;
la slim' de la sango
malvarmiĝas sur nian vizaĝon
    - larmoj de jarmiloj ne povas
    forlavi de sur ni
    malhonoron de raso nia!

En okuloj niaj tie estas
la ombro malhela de l' malbeno:
pagana senfido,
dub' maturigata,
trompiĝo pro divenoj grandaj
de l' profetoj
- ĉar la homo
mem devos foje
elaĉeti
ĉi tiun Mondon fine!

DORMU NUR!

Vi dormas.
Sur la kusen' defluetas
rivereto de hararo via...
Mi komprenas: lacigis vin ĉi tago!
Estus bone vian korpon
nun ĉirkaŭpreni
- scias mi: estas bonvarmege!
Gardeme ĝustigas mi
vian kovrilon:
ripozu!
Nun en nia sonĝo ni interbrakumos,
dormu nur!
mi vin ne vekos...

MIRAKLON NE ATENDU!

Mi estis mortinto via
sub polviĝantaj jartavoloj.
Ne kredis mi, ke vi foje
fosos por mi malsupren
en vian paseon.
Vi tion faris...
kaj nun vi atendas miraklon
- ĉar la mortinton vi ne povis
revivigi jam...

Vidu la ĉerktolon
de l' indiferent' sur mia vizaĝo!
Ĉu vi komprenas min?!
- Vere estas mi mortint', eterne,
sed nur sole *al vi* !
Per ĉifon' de kompato mi ornamas
vian humilon nudiĝintan.
Vane vi revenis nobliĝinte,
sen fiero!

Miraklon ne atendu!
Iru for!
- Neebleco estas la mortintojn
revivigi jam...

SOLA

Mi rememoras vin kaj tiun someron...
- Ho, nun mi denove restas sola jam!
Okaze mi trovis foton kaj leteron
- sed mi volas serĉi ilin neniam...
Jen la letero, la foto kai poemo.
kiujn mi ricevis de vi en somer';
tie restas sur la magnetofonbendo
viaj varmaj vortoj sen ĉia koler'...

Diru, kiel eblas tiom da malamo
en tiu ĉi voĉo post via forir'?
Ho, kiel ŝanĝiĝus tiu granda amo
en ironion post forflug' de l' sopir'?

Ho, se via ridet' denove ekbrilus!
Mi scias, ke de sur vango mia nun
sekigus la larmojn, kiel forsekigus
per sia brileg' la pluvgutojn la sun'...

PREĜO PAGANA

Estu benata varma korpo virina,
estu benata via proksimeco,
lulanta miraklon sur limo de l' mir';
estu benata via nudeco
kaj la varmegeco de via sin',
konservanta sekreton riĉan de l' ĝuo;
kaj estu benata via stelmonteta brusto,
en kies valo silentas la vira humil'.
Estu benata varma korpo virina,
estas vi nutraj por malsata vira sopir',
por kiu vi estas eterna kaj sanktoleita reĝin';
per oro matura de l' blonda tritiko,
per velurnigraĵo de l' malhela nokt',
per bruna terlumo de la freŝa plugo,
per ruĝ' fandigita de l' ruben' sparkanta
ekbrilas reĝinkron' de via harar'.
Riĉuloj, almozuloj submetas sin al vi,
antaŭ viaj piedojn reĝoj genufleksis -
estu benata varma korpo virina,
kontentigu nian soifon, atendantan je miraklo;

plenigu nin per varmeco de korpo via,
levu nin sur trezoran altaron de l' ekstazo,
dissemu pian enprofundiĝon de l' karno kaj sango,
kaj ĝermigu novan vivon el via sino kara
post la festen' benata de l' konsekrita kisaro
kaj interbrakumado,
nun
kaj por ĉiam kaj eterne,
amen, amen, amen..

NE AŬDU!

Ne aŭdu
Kara,
fieran babiladon
de l' lipoj farbitaj -
malantaŭ nia dorso
knaru nur
la bunta papagaro
arogante
per malestim':
Ho, ĉar ne povas ili scii,
ke ĉiunokte
el la gorĝo
de tiu simpla
birdeto griza
mirinda kanto fonta.

EN ĜARDENO DE L' DIO

Plenumiĝis nia ammiraklo;
nun ĝarden' de l' Dio malfermiĝis.
Ankaŭ mi volis, ankaŭ vi volis -
fast' de l' sopir' turmenta finiĝis.

Korangore en la sekretgarden'
promenas ni, kaj softe, ektime
brakumas ni unu la alian
kun nuda haŭt' en silento mire.

Vojperdinte trema lumradio
sur la densan orhararon kuras;
statublanka estas via korpo,
sur kiu nun hontemrugo brulas.

La konjektan haŭton ektuŝante
sekreto eksplodas, ke ne time
sufokiĝu ni en ĝu' de kisoj
liberiĝe kaj ekebriiĝe.

Tra l' mirinda ĝardeno de l' Dio
iras ni nun inter febraj ombroj,
kie krias voĉ' sekreta al ni:
por minuto estu vi do dio

DUONVOJE

En griza vojaĝmantel' de l' simplaj zorgoj
paŝadas mi
sub arkaĵ' de la esto,
kaj eluzis mi jam duone
la skeleton strangan de l' anim',
kiun mi pruntepreniis,
kiu estas naskita el nenio,
kiu estos falanta al neni'...
Mi ne sĉias:
ĉu iam miaj paŝoj eĥos ie,
sed mi ne povas halti duonvoje
en la tempo fornebuliĝanta,
ĉar puŝas min urĝante antaŭen
la tagoj senpaciencaj de miaj jaroj,
tumultantaj malantaŭ min.

DU OPINIOJ

Ŝi ne volis idon
- kaj ne la unua ŝi estis
kiu tion diris:
Naski estas peko
kiam est' de l' homaro dubiĝas.
En botelo de l' sorto nia
fantom' nuklea sidas enfermite.
Kaj estas maldika la vitro...
Kiu povas scii:
Kiam tuŝos ĝin
la fingroj de l' malamo?

Tion ni diris:
Kiu sian fidon perdinte
la posteŭlaron ne entreprenas,
ankaŭ tiu estas murdisto -
murdisto de l' nenaskitaro.
- Vivtempo de l' homo nelonga estas,
kaj senfruktiĝos la gutoj de la ŝvito,
kaj vaniĝos la sang'...
Havi zorgon pri estont' -
tio fidon bezonas,
kaj homojn, je kiuj ni kredas!

- Ja, rezigni niajn idojn
estus fino de l' homaro
eĉ senbataliloj!
Pripensu nur:
kiu estos pli kulpa,
se eraros?

MALMULTA ESTAS ANKORAŬ LA LUMO

Ni kredis tion,
ke ĉirkaŭ ni eterne lumoj brilos...
Tial ni venis
tra la kampoj, ŝaŭmantaj kun verd'
sub la kupol' de l' ĉielo, sparkanta inkoblue,
tial ni venis
tra l' lumkolorpluvego,
kie ardas la sun' kun flaviĝanta or',
surfluanta l' arĝenton de l' river',
ĉar ni volas ĉirkaŭ nin tordi
la brilrubandon de la ĉielark'...

- Kaj en la grizaĵon tiel ni alvenis!

Lavas grizaj pluvoj nun nian vizaĝon
kaj blindan spegulon de l' morta river',
kaj koto ŝvelas sub ni -
glueca kaj malluma...
Ni ne vidas la sunon,
kaj ne povas la ĉielarkon
ĉirkaŭ nin tordi...
Jam ankaŭ la vojo paliĝis plumbkolore,
sur kiun ni venis,
kaj en la grizaĵon
ankaŭ mem la homo
lante engriziĝas...

AMA VERSAĴO

Ne sur etoskamp' aroma
trovis ni unu la alian inter du komplimentoj,
kiujn kunportis al ni la vento
okaze, milde,
kiu deŝiris minuton paseman
el la parfumo forvaporiĝanta
de l' rapidvelkantaj floroj,
kaj kiun minuton
ni enĵetos nelonge
- seniluziiĝinte -
la vizaĝon de unu la alia.
Ne!

Intence serĉis ni unu la alian
kun obstin' amara
inter la disĵetitaj minutfragmentoj
por manpremi
en la spacpremanta grizaĵ'
de l' rokegoj, ekstarantaj ĉirkaŭ nin,
kie ŝtormoj streĉiĝas
super nian kapon obstinan.

- Sciis ni, kiun ni entreprenis!

Pli dura estas ĉi manpremo
ol materio de la ŝtonoj
pli forta estas ĉi federaĉio,
kies ardaĵon ekscitas
sovagaj furiozoj de la fajfanta uragan'...

SENESPERE

Ĉu vi volus disrompi
rustan fenestrokradon
de via sortprizono senluma,
ke vi foje povu turni
vian vizaĝon
vere al la sunbrilo?
- tre povas dolori la premo friska
de la spaco kuntirita por tiu,
kiu ĉiam sopiris
al la senfina distanco!

Gapi ĉiam senpove
la silenton surdiĝintan...
Dume scii, ke vi
je multe pli estas destinita,
vi, reĝo mallibera,
kiu estas naskita
por pompa talaro,
vi, de sur kiu
ankaŭ lastaj ĉifonoj de la fido
jam iom post iom disfibriĝas...

AMARECO

Ĉu vi memoras
   pri la granda tristo, falinta sur vin,
   kiu ĝis la nokto nigriĝis plue?
Ĉu vi memoras
   kiel vi vagadis
   kun vundita anim' en la vento veadanta,
   kiu ne povas estingi la flamojn de la febro?
Kiel premis vin tiu ĉagren' estinta!
Kiel ardis viaj okuloj en siaj sekaj kavoj
   pro tiu marprofunda dolor'!
   Ĝi streĉis vin ĝis la spasmo,
      ĝi enamarigis vin,
ĉar al la viro ne konvenas la plor'...

- - Poste forrestis ĝi lante
   en la drivo de l' tempo inundanta:
kaj nun jam vi estas defendata de l' vana dolor',
   sed ĝin mildiĝite resendas io foje-foje,
   kiel amaretan fumon
            la forfluganta vent'..

KUN LEVITA KAPO

Senfido neniam misformu vian vangon
- ĉi ombro-akompanant' de l' vivo kaj de l' est' -,
se ne ekflagras alten la giganta flamo
per fajrer' elsaltanta de via homa vol'!
   Vidu formikmiliardon de l' penanta homar',
kiel akiras renomon klarluman nun por homo
sur la polvero de la universo,
eksplodinta iam el centro materia!
   La individuo
estas nedividebla celo de l' homar';
kalkulas la bezon' je viaj du manoj -
Kaj fari nian faron ne estas malpli grava,
ol montri la direkton de nia agad'.
   Do levu vian kapon supren kaj fiere,
ĉar HOMO vi estas
   en la oceano de l' tempo kaj de l' spac'!

VOJO DE L' GRIZULOJ

Oni migras grize, triviĝinte;
de sur siaj inflamaj vundoj lante deŝiriĝis
la ĉifonoj de l' sorto malbenita.
Sonĝoj marŝas post la dorsoj kurbiĝintaj.
Sonĝoj, dronigitaj en la vinon,
naĝas en la polvo kirliĝanta
de la realeco.

Kuras senlume la senfruktaj minutoj
- kaj similas ĉiu vizaĝ' ĉiam al la sama -,
kaj sub la giganta pez'
interne ekveas nur la murda streĉigo
de la memfermitaj spacoj,
dum venas entombigi
feston kaj dimanĉon
la funebrovestitaj nigraj birdonuboj
de l' tagoj semajnoj.
Inter la esto kaj neest' tra l' nenio
transtreĉiĝis la voj',
kaj ĝi ie, fore, en la horizonto
enkuras la humidan mallumon
de la terodora
profunda fosaĵ'.

FOJE SOMERO ESTIS

Venas la knabino...
En okuloj ŝiaj somero brilas -
deksesjaraj febroj...
Lumon ĵetas la sun'
sur ŝian ĝinzon bluan,
kaj kiam ĝi ektuŝas
sian bruston
super la bunta bluz',
sveninte ĝi enfalas
arĝentospegulon
de l' sonĝanta river'...

Ŝi atingis la knabon...
Brulas ŝia korp'
kaj la vortoj ardas...
Ne povas mildigi jam la sangon
la obtuza voc' de l' ondofrapad'...
Promesas frenezan ĝuon
la mutiĝanta vort'...
Arde kunfandiĝas
do la febraj korpoj
sur la ora sablo fajreranta
de l' brilannta bord'...

... Ĉifoniĝis jam la ĝinzo,
delonge eluziĝis,
paliĝis jam la bunta bluz' -
kredplena ĵur' de l' gaja junec'...
Malantaŭ la vortoj
griza zorg' kaŝiĝas:
mono,
fabriko,
lavo,
kuirado
kaj blonda infanet'...
Por ama vagado
ne estas plu temp'!...

- Do, kie restas la plezur' promesita?

... Ĉar vespere laciĝis la edzo
kaj laciĝis la edzin'...
Nur la sonĝoj
kunfandiĝas arde
sur la ora sablo fajreranta
de l' brilanta memor'...

REPAGULUM*

La gracila kirko enĉielpikis orgojle
siajn ponardturojn,
kaj ĉirkaŭ ĝi pajlotegmentaj domaĉoj
riverencis
en la polvo flaviĝanta de l' argilo
malantaŭ la latokradoj
de l' nigriĝintaj palisaroj,
kadukitaj de zorg' -.
kaj nun mi vidas,
ke laŭ la stratoj asfaltospegulaj
kiel klopodas
kun pagana fiero al la nuboj
la modernaj blokoj
de la armitbetonaj konstruaĵoj,
kaj en ĝiaj gigantokreskintaj
ombrofaskoj
kiel kaŝas sin humile
la iama kirko
ŝrumpiĝite
kun ĝiaj turetoj magraj...

** Repagulum estas punkto, kiam la ŝanĝiĝo de la kvanto trairas la ŝanĝiĝon de la kvalito.*

NENIU DEMANDU PLU...

Neniu demandu plu,
kial oni prijuĝas la virinon,
se ŝi alian vivcelon elektas
kaj ne la "vartecon, vindtuklavon"
- ĉar ŝi rajtas pri ĝi.
Neniu demandu,
ĉu stulta estas tiu,
kiu forĵetas la komforton,
sciante,
ke ŝi neniam ricevos dankon por ĝi.
Sed oni demandu:
zorgon kaj trankvilon
de la olda generacio
ne la posteularo entreprenas?
Kaj oni demandu:
kiu ne guvernas infanojn,
tiu kiarajte pretendas je tio,
ke la posteuloj de aliuloj
surprenu ŝian ŝargoĝon,
kiam ekrompas
la alvenanta maljuneco
ŝian talion?

LUMO KAJ OMBRO

Ni vivas ĉi tie,
en driva torent' de l' dudeka jarcento
kun klarig' scienca de l' ideoj modernaj,
kaj mortis la mirakloj en okuloj niaj...
Sed kaŝis sin ankoraŭ en ni
fantomo jarcenta subkonscie,
kiel la ombro ŝteliĝanta
sekve de la lumo,
ĉar en ĉi mondo dividita
ia ESENCE GRAVA estas postrestita
malantaŭ la teknika prosper'...
Kaj kiel la nokt' luktadis
kun la radioj de l' suno,
tiel ŝiras siajn ĉenojn furioze
ia obstina fantom',
forlasita en mi...

POST DEK JAROJ

Ĉu vi vidas,
kiel turniĝas nia amo
el la somera sunbrilo
al la ŝmacanta koto
de l' aŭtuno, gravedigita
de zorgopluvoj,
kaj kiel rompas ni lante
niajn vortojn, kiujn ni
donis iam unu al la alia?

Ĉu vi sentas,
kiel peziĝas sur niajn ŝultrojn
la griza servutlabor', kiun ni
faras unu por la alia, kaj kiel
disfluas la rapidiĝanta temp'
el niaj kalaj polmoj?
Vidu,
restis nur tiom da tuto:
kelkaj intimaj minutoj
en la mola silento de la nokt'
- plenmana, ŝtelita plezur'...

Kaj tamen estas inde!
- Ĉar en niaj tagoj pulsas
la ĝojo finluktita de l' labor',
entreprenite unu por la alia,
ke la vivo nia ricevu racion,
celon laŭ la leĝo eterna
de l' ekzistado unu per la alia.

PEJZAĜO DE L' XX-a JARCENTO

Post niaj veturiloj
flugas bru', balaaĵ kaj polvo;
spirad' nia estas
stink' de l' benzin- kaj dizelmotor';
ni staras ĉi tie,
en kalvaj arbaroj de l' nuda beton'
kaj de l' griza ŝtono,
kuras flava ĉiel', sombrita de l' fulgo
super la kupoloj de l' oleaj haloj.
En la kotaj akvoj
fiŝoj pufiĝadas,
la lagoj kaj riveroj
estas koloritaj de mortiga suk'
de l' industria venen',
dum la ventoj, amaritaj de l' fum,
priploras la arbojn veantajn,
kiam la ŝrikanta segil'

per voremaj ŝtaldentoj
enmordas ĝiajn fibrojn
en la maldensiĝanta arbar',
lavite de l' pluvoj acidaj...
Vane fuĝas la bestrasoj,
al la morto kondamnite;
lace oscedas la prirabita minej';
frapas polvopluveg'
la malsanajn kampojn.
Fer',
oleo,
fumo,
fulgo kaj ŝton',
skorio kaj gaso,
rust' kaj beton',
stinka suk'
kaj radianta cindro
- kaj skatol' da *ANDAXIN* en la poŝ' -
jen: nia moderna romantiko!

MIA PATRINO

Se atakis min la febro,
kaj venkis la malsan',
maltrankvile kliniĝis ŝi
super mian vangon,
ĉar ŝi volis: mi vivu!

Ŝi volis: mi vivu,
ĉar nur ŝi sciis,
nur ŝi sola,
ke mia ekzistado
kiom da febroj,
doloroj, plezuroj
kaj malbenoj enhavis.

Jes, enhavis ĝi febron
de l' plezur',
enhavis ĝi erodon
de l' dolor'!

Ŝi sorbis en si mem
mian ĝojon,
kaj ekbrilis ĝi reen
en siaj okuloj,
kiel reflektiĝas
la dissparkanta
trasencado
de l' lumstrio-ekfulm',
enĵetite
gigantan spegulon.

Ŝi absorbis miajn larmojn,
kiel sangon la ter',
kaj la malviglaj flakoj
de l' varmetaj tristoj
lante amariĝis en ŝi
brilanta salo
sur la kaŝitaj sulkoj
de l' ŝia anim'.

Fadenmiliardoj
de la praa amo
teksis en mi novan histon
de l' sango kaj karno
el la nobla renoviĝo,
laŭ la leĝo eterna
de siaj praŭloj.

Kaj antaŭsentis ŝi
la leĝon,
ke baldaŭ si sentos foje
per sia sentema instinkto
en mia kis'
la bole pulsantan
spiradon de alia virin',
kiu estas filtrite
premita en mian sangon
per svit' kaj dolor'
tra miaj nervofibroj.

Mi sciis, ke ŝi sciis tion -
kaj min ŝi tamen
entreprenis...

Kun dolor'
streĉigita en spasmo
de mia alveno sur mondon,
ŝi etreprenis ankaŭ
la sekvantajn turmentojn,
la turmentojn
de l' elluktita feliĉ,
kies graviĝantajn blokojn
la sklava tempo unuis
giganta piramido
sur la sablo flaviĝanta
de l' anim'.

Miaj horoj de neglektado
forĝiĝis krianta akuzo
en ŝiaj okuloj,
dum ŝia mano
la krudan solecon
trakaresis milda silento
sur mia obstina frunt'.

Kaj ŝi venis kun mi
en ŝtorm kolera
de l' zorgopluveg'
malsuprenfalanta,
ke per ŝiaj manoj ŝi
retenas la nubojn,
ke pli facila estu al mi io,
kaj al ŝi mem ĉio estu
ĉiam pli kaj pli malfacila,
ĉar la sinoferon ŝi
lante traformis
la ĉiutagaj elementoj...

Kaj galop' monotona
de l' labortagoj levis
la etan virinon
lacrompitan
super ĉiujn inojn,
kaj ornamis sin milde
per riĉa talaro
de l' varma amo
de l' kanonizitaj.

Kaj preĝeja amhonoro
sankta ĉirkaŭas
arĝentan glorkronon
de ŝiaj haroj fumgrizaj,
ĝis kiam ĉion komprenas
la hontema filo,
maturiĝinta vir',
kaj li brakumas
sur sian larĝan bruston
kun malfrua ruĝiĝo
la komprenitan,
rompiĝeman
kaj la plej fortan virinon,
kiun neniam rompis
la malfidemo,
kiu povis fari ĉiam,
kion ŝi fari devis,
kaj sur kies bruston
la vir' denove kaj denove
remildiĝas filo.

HEREDAĴO

Patro mia!
Mi alvenis kapon malsuprenklininte
antaŭ vian tomboŝtonon,
nigriĝita de l' kandelfulgo,
por renovigi vian leĝon kaj kredon.

Vidu,
ne vane sangvundis
vian ŝultron la pezaj ferfaskoj,
kaj ne vane griziĝis
via hararkolor' pro la zorg'.

Nun mi denove aŭdis
viajn vortojn suprenpenetri
el la profundo:

"Vi devas vivi tiel,
ke vivi estu ĉiam pli forte inda,
kaj ne forgesu,
ke sekreton de l' eterneco gardas
la fekunda sino de viaj virinoj
- naskiĝu denove kaj denove,
kiel la arboj, kiuj nobliĝas arbaro
el la humo de l' enterprofundiĝinta
putraĵ'..."

Patro mia!
Nun mi pagas la entreprenintan
ŝuldon: - nokte naskiĝis mia fil'...

Vidu,
nun ni pli proksime alvenis
unu al la alia, patro!
Nun al mi griziĝas la haroj
sur mia tempio, kaj nelonge
ĉe mia tombo ekstaros mia filo
meditante,
kaj li scios, ke
- sub siaj plandoj -
la polviĝantaj tertavoloj solvas
la songon de generacioj
leĝo kaj kredo...

HIPOTEZO

Nia Ter' ŝrumpas ereta insulo
perdiĝanta en nebulon
sur la spiralbranĉ' ekstera
de nia galaksio -
en la ega infinito
de la kosmaj maroj;
kaj oni nenion scias pri ni fore,
sur la kulturitaj kontinentoj
de l' sferostelamasoj
de l' astrourboj gigantaj.
Oni ne konjektas, ke fore, flanke,
multmiliona lumjardistance
de kutima veturlinio de l' kosmoŝipoj:

la naskitoj de l' sama materio
sanĝiĝas intelekto ie,
nur nun elprove iliajn"barketojn".
Oni ne sĉias, ke ĉi tie ankoraŭ
sovaĝuloj vivas, kiuj inter la klanaj
kolizioj manĝegas unu la alian
kun sensenca pagana malamo
laŭ la venenitaj vortoj
de iliaj brutalaj, stultaj magiistoj...

NOVAN!

La malnovan, eluzitan
devintus jam delonge ni forĵeti!
Forĵeti, kiel la ŝelon superfluan
la alveno de l' ĝermad' nova, verda,
kaj komenci ion denove
pli belan
pli bonan, pli kompletan!...
Sed prenas nin
la rustaj ferokrampoj
de la leĝo.
Grinĉas la katenoj ŝimaj
de nia kutim',
enmordas la karnon,
kaj vi povas krii jam plengorĝe:
vian voĉon subpremas
la tintanta ĉenbruo
kaj la malben',
makulita de l' mucido
de la malnovaj,
kreviĝintaj muroj...

ION GRANDIOZAN FARI!

Ni, multe el la homoj,
volas ION GRANDIOZAN FARI,
ion,
kiu levus nin,
kiun oni admirus - -.
Eble ni jam scias,
kiel tion
ni devus nun komenci - -.

Poste ronĝas
lante nian volon
la grizaj zorgomuŝoj
de la labortagoj - -.

DO, TION NI MORGAŬ FAROS!

Poste tiu morgaŭ
lante haltas sur la rifo,
ie fore,
trans la malklara ondofrapad'
de l' ĉiutagaj zorgoj - -.

DO TION NI FOJE FAROS!

Poste komencas defali
la eluzita emajlo
de la fido...
Kaj foje io konsternas nin,
io nin brustbatas
- antaŭ la lasta moment':

ESTAS JAM MALFRUE!

- Do, iuj aliaj devos tion fari...

DEKSEP JARA ESTIS LA KNABINO...

Deksep jara estis la knabino -
kaj, laŭmode, tute mismoderne,
ŝi altaron levis por la virin'
ŝanĝiĝinta egala al la vir',
kaj en si mem kun erarfid' orgojla
ruinigis la statuon de la patrinec'.

Ŝi forgesis tion, ke ankaŭ ŝin
naskis patrin', kaj forgesis, kial
kreis la natur' la homon el du seksoj,
ŝi ne sciis, ke la senfrukta sin'
ne indas je malŝpara plezur',
kaj leĝon rompas tiu,
kiu disŝiras la ĉeneron de l' posteularo,
leĝon, kiu venĝas sian vivon,
ĉar estas malfrue rekoni:
terura estas la fermita solec'
de la maljuneco,
kaj radiantan rideton ĉastan
de niaj gefiloj
neniu povas anstataŭigi...

XX. JARCENTA PETEGO

Sinjoro nia, Vin ni petas,
aŭskultu petegon nian!
Ne lasu venki
la Diablan Menson,
savu nin de la
Servistoj de l' Satano,
savu nin de la
Depotitoj de l' Diablo!

Sinjoro nia!
Volas ĉesigi la Homo tion,
kion Vi kreis.
Sinjoro nia,
la Mavulo
volas esti Dio sur la Ter';
li volas Fajran Gehenon,
Sodomon kaj Gomoron,
Kaŭstikan Sulfurpluvon,
en kiu ŝrikas al Vi
la anim! de la senkulpuloj.

Sinjoro nia, Vin ni petas,
aŭskultu petegon nian:
Nova Diluvo estus bezonata,
ke pereu
denove la Malbonegul',
ĉar alvenis la temp';
por la Nova Diluvo
maturiĝis denove la Mond'!

Sinjoro nia!
Konstruigu Novan Arkeon,
kaj savu denove
la bonulojn;
inundu sur la Teron
la ŝtormonuboj
de Via perea koler'!
Pluvegu denove kvardek
tagojn kaj kvardek noktojn,
kaj lasu en la Abismo
de la Mar'
la Frenezulojn,
la Nuklean Fantomon,
la malbenatan sistemon
de l' raketoj,
ĉar oni agas kontraŭ ni,
kaj kontraŭ Vi, Sinjoro nia,
ke pereu ĉio,
en kiun Vi foje
amimon spiris!

Inundu nin
per Nova Diluvo, Sinjoro nia!
Konfidu al la Bonuloj,
kaj senhavigu la Malbonulegon
de la potenco,
kiu voluptas en la kot'
de la plej abomena Kulpo!

Inundu nin
per Nova Diluvo, Sinjoro nia!
Kaj poste, kiam ni elpaŝos
en la Lumon denove
sur la Monto Ararato,
komenĉiĝu denove la Vivo:
pli bela, pli racia,
pli nobla kaj pli homa!

Inundu nin
per Nova Diluvo, Sinjoro nia,
ke venu la
Nova Reviviĝo,
kaj sendu super nian kapon
muĝantajn Fajrolangojn,
ke ni renoviĝinte
en nia Fido
povu saluti
la Novan Tagon de Ruga Pentekost',
kaj ni povu estimi
nin mem denove kaj denove!

Inundu nin
per Nova Diluvo, Sinjoro nia,
ke ĉastiĝu
denove la Homo,
ke kun ĉasta Kanto de l' Paco
laŭdu ili la Lumon kaj Tagon,
kaj sen timo ili povu
rigardi al la ĉiel',
povu labori por sia plezur',
nun kaj por ĉiam,
por eterne,
amen,
amen!



KREPUSKO EN VÁC

(Tradukis Tibor Papp)

Brulas en suno la frondo de l' arboj,
mutas krepuska pejzaĝo sen zum',
flagras la briloj de sunaj radioj:
lavas en akvo la oron de l' lum.

Ombroj de nuboj surkuras ĉielen,
ardas batiste - susuras la lum',
ili plunaĝas en muto etera,
treme la placo resternas sin nun.

Estas la sun' de ĉielo dormeme,
sango-purpur' ĝia gutas al ond',
lantas la olda Danub' kolorita,
tremas sur saŭmoj la blu-lila mont'.

Kaj siluet' de la monto Piliŝ-o
kuŝas nun sur la dormema river'
blu-malheliĝas en frosto silenta,
lante la lumon nigrigas malhel.

Brilas la ondo falinta surborden,
perle argentas spruĉanta lumer',
dormas la mont-silueto malhela,
lante fornaĝas pejzaĝ' en vesper'.

ANTAŬTAGMEZ' PRINTEMPA EN PARKO DE DEÁKVÁR

(Tradukis Tibor Papp)

Spar-desegnaĵoj sur flanko de domoj,
felt-plumaĵoj sur park-benkoj rompitaj,
sub puŝ-najloj sur arb' anonc-kartonoj,
kaj park-rande sin paŝtas safoj spitaj...

Ĉipsujoj, vaflo-paperoj susuras,
pecoj kola-botelaj, sakoj hidaj,
cigaredujo, viŝgumo sin rulas,
inter ruboj staras arboj rigidaj.

En la glitejon vomas ebriulo...
Lin naŭze rigardas la infanaro,
dum ŝanceliĝas pro l' vom' lum-konturo,
ĉe bushaltej' mortero post defalo.

Jen aŭtaĉoj en parkejo malpura,
dum suno sin kaŝas, staraĉas hontaj;
jen jak-vestita aro pensiula
ludadas per kartoj ĉifoniĝontaj.

Botelo apudas. En ĝi vinaĉo;
pompas sub hund-fekajo eŭforbio,
kaj fiera gardist' en malpuraĵo
promen-patrolas: nu okazas kio?

Ĉe rubbarelo turt' en bekumado,
plastflakon-kikadas knaboj sen halto,
pneo en fosaĵo, rusta fer-lado,
ce l' bord' fulgita robini-bastardo.

El ĉiel-okulo jen larmo-falo,
niaj hontindaĵoj ĝin embarasis...
Meze de Eŭrop' ni vivas, homaro,
dudek jarcentoj damnitaj jam pasis!

TRADUKOJ

Ady Endre
SONĜO DE PAŬL VERLAINE

Pri virin' mi sonĝas, kiun mi ne konas,
kiu estas stranga vizio benata,
sed neniam estas alia aŭ sama,
kiu min komprenas kaj fidele amas.

Ho, ĉar mian koron nur sole ŝi vidas,
ke en ĝi ne estas mistero sekreta,
svitrivereton de mia frunto pala
ŝiaj sanktaj larmoj jam freŝe pluvadas.

Ĉu ŝi estas bruna? ruĝa? aŭ blonda?
Ŝia nom'? estas muzik', molsonora
kiel nomoj de la amatinoj mortaj.

Staturigard' sia brilas malserene,
venas sia voĉ' el foraj' senlumege,
kiel tremado de l' vortoj formortantaj.

Ady Endre
SUR BORDO DE L' MARO BLUA

Kie aliaj vivas, amas,
Malsane tien mi alvenas
Kison kaj sonĝon entombigi,
Min sur la bord' ne trankviliĝi.

Nur al morgaŭo mi ridetas,
Kaj jam vagade forsopiras.
Mi flugus plu, sopiro vana.
Ho, mi trista ombro malsana.

K. Simonov
ATENDU MIN

Atendu: mi revenos,
Nur atendu tre...
Atendu, pluv' se portos
Triston nebule,
Se storm' alvenos neĝe,
Se l' suno ardos,
Geamikoj forgese
Min ne atendos.
Atendu se jam venos
Leter' neniam,
Se aliaj enuos
L'atendadon jam.

Atendu, mi revenos,
Kredu al neni',
Eĉ se iu inspiros:
Devas forgesi;
Se rezignantaj estos
Filo kaj patrin',
Se neniu atendos,
Ne forgesu min.
Pro mia mort' ruĝos vin',
Tamen ne trinku,
Se okuloj larmos min,
Atendu min plu.

Atendu: mi transiĝos
Tra ĉiu morto.
Neatendintoj diros,
Ke: "bonŝanculo".
Neniu povos scii,
Garde min tie
Per atend' via kun mi
Estis vi ĉie.
La sekreton sĉios ni -
Mi kaj vi, kiu
Tiel povis atendi
Kiel neniu.

(1942.)

Vinokurov
FORGESIS NI LONGE...

Forgesis ni longe la knabinojn,
kies ŝultrojn brakume ni vagadis,
kaj elpensis tiajn historiojn,
kiajn ni jam delonge eĉ ne blagis.

Varm', lunlumo. Nokto tempon-hava.
Ni kelkaj, laŭtaj, senmaturaj knaboj
kredis: en ni estas multkolora
tuta saĝeco de la grandaj amoj.

Simpla, varma am' de ĉarmulinoj
multe ĉe pezo al ni do ne pezis,
ride ilin ni, la fieruloj,
alvenon de la sent' senmorta kredis.

Jaroj iris. Sufiĉe ni vivis.
Doloras nun, ke vane atendis ni,
kaj do tiu, kiun ni ne trovis,
nur inter ili, tie devis esti.

Apollinaire
KOLĈIKOJ

Floras venen' sur la kamp' ĝis aŭtuno tarda
paŝtiĝas la bovin'
ĝis veneniĝo lanta
floras kolĉikoj kun blu' kaj violkolor'
okuloj viaj revadas kiel ĉi flor'
bluas kiel petalo kiel ĉi aŭtunoj
veneniĝas mia viv' el viaj okuloj

Studentaro kuras kriege sur la kamp'
manteloj flagras sonas la harmonikokant'
filin' patrino estas la floro plukita
kies koloro timvibras kiel palpebro via

kiel vibras la flor' en vent' genuflekse

Kantadas la bovist' mallaŭte kaj softe
dum la muĝaj bovinoj forlasis vapore
ĉi kampon pretiĝantan por mort' porĉiame

Ady Endre
PLORI, PLORI, PLORI

Atendi se l' noktmezo gongas
Pri ĉerko kiu proksimiĝas.

Kaj kiu mortis, ne eksĉii,
Kun funebrantoj sonorigi.

Arĝentendoj, vualoj nigre,
Iri sub ili krucon svinge.

En arĝentspez' funebre stari,
En torĉofum' sufokiĝadi.

Kun ombroj bruaj ekbatale
Obtuzan psalmon kanti pale.

Aŭskulti orgenozumadon,
Kaj sonorilegomuĝadon.

Paŝi tra tomboj nekovritaj
Kun pastra morn', servistoj mutaj.

Kaj min kaŝinte treme gvati,
Al fremdmortinto rigardadi.

En missorĉluna nokt' frosteti,
En l'incensfum' profundspiregi.

Paseon nei missorĉite,
Brustbatante, surgenuiĝe.

Penteme ĉion nun konfesi,
Funebroĉerkon surfaleĝi.

La testamenton ellabori,
Sed teruran, kaj plori, plori.

Paŭl Verlaine
AŬTUNA KANZONO

Ploras l' aŭtun',
veadas nun
kun dolor',
veke triston
kaj kapricon
en la kor'.

Veas la nokt'
en febrofrost',
kaj la hor',
venas al mi
min ĉagreni
kun dolor'.

Defalas mi,
orfa foli';
sur la ter'
pelas la vent'
min tra l' silent'
sen esper'...

FÉNY ÉS ÁRNYÉK

A *Lomo kaj ombro*
magyar változata

Kármán József Társaság



AZ UTOLSÓ MENET
La lasta rondo

Egyszer elémbe áll,
kihív majd a Végzet.
Megállok előtte:
hadd lássa, nem félek!

- Jöjj csak, mérkőzzünk meg!
Nincsen mit vesztenem!
- kiáltom felszegve
konokul a fejem.

És birkózunk vadul
árkon és sövényen:
ő győz, és én vesztek
szépen, sportszerűen...

AZT MONDJÁK...
Oni diras, ke...

(*Nincs magyar változata*.)

MONOLÓG
Monologo

Magányos farkas vagy, izom és acél,
foggal és körömmel tartod fenn magad,
nem tör meg az éhség, a fagy és a szél -
magányos farkas vagy: erős és szabad.

Társtalan kóborlod át az éjszakát,
s elnyújtott hangod, mely félelmet kavar,
úgy tépi fel az éj jeges bársonyát,
mint roppant csöndet az érkező vihar.

Szemedben, ha indulsz, büszke tűz lobog,
s utadból nyüszítve térnek ki az árnyak -
de mi lesz majd, mondd, ha bundád megkopott,

megvénülsz? Könnyeid senkinek se fájnak,
ha gyöngülő tested a földre hull -
úgy múlsz ki, mint éltél: társtalanul...

FELESÉGEMNEK
Al mia edzino

Enyém vagy -
   sorsod pecsétje: létem.
Enyém vagy akkor is,
   ha most már nem akarnám -
s tudom:
   szemfedőmön át is
   én foglak nézni majd
a fiam két szeméből...

AZ ELLOPOTT SZEMEK
La okuloj ŝtelitaj

Szemedben lidérces fények lángja lobban:
kiástad a sírból holt kedvesem szemét -
ő néz két szemedből, s vágy gyúl ki azokban
felszítva a holt láz régi őrületét.
Igen, szemeidben kölcsönvett tűz lángol -
zöld kísértet-lámpás nagy, foszforos szemed,
melyben üzenetet küld a túlvilágból
az, aki már rég az Örök Térben lebeg...

S hogyha két szemedben az izzó fény kigyúl,
túlvilági örvény torka ránt a mélybe,
és a vad gyönyörben ott van hangtalanul

a sírból jött kedves izzó ölelése -
vad láz, részeg mámor, és te meg se sejted,
hogy régi szeretők ölelkeznek benned...

HAJNAL FELÉ
Post hejma bulio

Sűrűsödő füsttel volt
telt az elkábult szoba,
tört palackok szerteszét:
egy átzüllött éj nyoma.

A magnó lenn a földön
még szüntelenül bömbölt,
vad ritmusa a twistnek
az agyakban dörömbölt,

de már nem táncolt senki:
a pamlagon hevertünk -
terjengett a fáradtság
és álomsúly felettünk.

Majd egyikünk felkelt, hogy
a függönyt húzza széjjel:
kinn már hajnalba fordult
a vad, mámoros éjjel.

Te is felálltál lassan
és az ajtóhoz mentél,
még bágyadt mosolygással
rám vissza is nevettél -

kiléptem utánad, s ott
kinn a hajnali ködben:
láttam, amint az ajkad
már mást csókol helyettem...

MIKÉNT NÖVÉNY A FÉNYT
Kiel lumon la flor'

Miként növény a fényt, én úgy kívántalak,
vakká és süketté tett ez a szerelem,
istennőm voltál te, és én imádtalak,
szent téboly lángjait tükrözte a szemem.

Nevedet imákba, zsoltárokba szőttem,
és lábad elé szórtam legszebb verseim,
az Éden kapuját nyitottad előttem,
és jaj, most azt tanulom meg, hogy mi a kín!...

Nem imát, korbácsot érdemeltél volna,
ami felszaggatja hófehér húsodat,
s ütni kéne tested, amíg a kar bírja,
s fel nem sírna benned lassan a bűntudat!

ÖNVALLOMÁS
Memkonfeso

Senki sem vagyok, és semmi sem vagyok,
hangya csupán a sok közül.
Teszem a dolgom éppúgy, mint a többi;
születtem s élek emberül.

Semmi sem vagyok, és senki sem vagyok,
egészből csak parányi rész;
a munkám értelme attól függ csupán,
hogyan áll össze „AZ EGÉSZ”.

Parányi hangya, egy pont a sok közül
- senki és semmi - ez vagyok.
Teszem a dolgom éppúgy, mint a többi;
születtem, élek s meghalok.

JÓL FÉSÜLT GYILKOSOK
Bone kombitaj murdistoj

Szívélyesen mosolygó gyilkosok
a demokrácia és béke nevében
hányják, vetik, mérgezik a sorsunk
- villamosszék helyett az elnöki székben!
Díszemelvény és békeszólamok,
s újabb milliárdok újabb rakétákra,
hadd várjon az éhség-övezetben
vegetálók hada irgalmas csodákra!

S Libanonban ó, hogy „dúl a béke”!
És „rend és nyugalom” a Közel-Keleten,
Salvadorban és Afganisztánban,
s grenadai „hőstett” egy kicsiny szigeten!

Neutronbombák, szárnyas rakéták,
s a vegyi fegyverek széles arzenálja,
és az „első atomcsapás joga”
feltétlen a béke szent javát szolgálja!

Mesélhettek, képernyőn vigyorgó,
űrháborús agyrém fésült bajnokai,
az emberi jogokról s békéről -
„hitlerek”, „sztálinok”, téboly lovagjai!

Hinnünk kell, hogy egyszer minden őrült,
ki ott ül a Halál elátkozott jobbján,
a józan ész végső győzelmére
bevégzi sorsát a Világ Szemétdombján!

MARS ISTEN FOGLYAI
Obseditoj de l' masakro

Nem változtatta meg még
senki isten kínja
ezt a háborúkba őrült,
átkos komisz bolygót
- a Föld népét az isteneknek
valójában
nem sikerült soha megváltani!
Értünk hiába lopta el
a tüzet Prométheusz,
és hiába feszítették meg
Jézust:
Káin bélyege ott üszkösödik
konok homlokunkon!
...A gyűlölet fekete sarát
tapossuk;
arcunkra a vér
alvadt szennye hűl

- ezredévek könnye sem
mossa le rólunk
fajunk gyalázatát!
Szemünk köré lassan kiül
sötét árnyékként az átok:

pogány csüggedés,
érlelődő kétség,
csalódás a szentek s próféták
nagy jövendölésein
- mert e világot végtére is
magának az Embernek kell
egyszer megváltani!

ALUDJ!
Dormu nur!

Alszol.
Hajad fonatja lecsordul a párnán...
Tudom, megfárasztott ez a mai nap!
Jó volna tested most karjaimba venni
- tudom: jó meleg!
Takaród óvatosan igazítom:
pihenj!
Majd álmunkban öleljük meg egymást,
aludj most,
én nem ébresztelek...!

NE VÁRJ CSODÁT!
Miraklon ne atendu!

Az évek porló rétegei alatt
halottad voltam.
Nem hittem,
hogy múltadba egyszer
leásol még értem.
Megtetted...
És most csodát vársz -
nem tudtad a halottat
feltámasztani!...

Nézd
arcomon a közöny szemfedőjét!
Nem érted!?
- Én valóban meghaltam:
neked!

A szánalom rongyaival ékesítem
lemeztelenedett alázatod -
a gőgtől megtisztultat.
Ne várj csodát!
Menj!
- Nem lehet a halottakat
feltámasztani!...

ÚJRA EGYEDÜL
Sola

Halványuló arcod felidézem újra...
Jó volt veled, és most újra magam vagyok.
Nélküled még minden oly szokatlan, furcsa
- a régi emlékek közt árván kutatok...

Régi levelek, gyöngybetűid, egy fénykép,
verseskötet, mit nekem vettél egykoron,
s meleg-fényű hangod egy-egy foszlánya még
megmaradt emlékül a magnószalagon...

Ó, mondd, hogy loboghat ma annyi gyűlölet
e hangban? Becéző szavad maró gúnnyá,
hogy válhatott? - Ha mosolyod beragyogná

újra arcom, tudom, hogy rajt' a könnyeket
felszárítaná, mint kibomló fényköteg
nyári zápor után az esőcsöppeket...

POGÁNY IMÁDSÁG
Preĝo pagana

Áldott légy te meleg asszonyi test,
áldott legyen a te közelséged,
mely csodákat ringat az ámulat határán;
áldott a te mezítelenséged,
és áldott a te öled forrósága,
mely a gyönyör dús titkait őrzi,
és áldott legyen melled két csillagos dombja,
melynek völgyében hallgat alázatunk!
Áldott légy te meleg asszonyi test,
tápláléka az éhes férfivágynak,
melynek örökös felkent királynője vagy;
a megérett búza aranyával,
az éjszaka bársony sötétjével,
a friss szántások barna földfényével,
a szikrázó rubin olvadt vörösével
villan meg királyi hajkoronád!

Koldusok s gazdagok hódolnak előtted,
királyok térdeltek lábaid elé,
áldott légy te meleg asszonyi test,
csillapítsd szomjunk, a csodára várót,
tested melegével fonj be minket,
emelj a révület kincses oltárára,
hintsd szét a hús és vér örök áhítatát,
és sarjassz új életet drága öledből
a felszentelt csókok
s ölelések áldott lakomái után
most és mindörökkön örökké,
ámen, ámen, ámen!...

NE HALLD MEG!
Ne aŭdu!

Ne halld meg,
Kedves,
a festett ajkak
gőgös fecsegését -
hátunk mögött
önhitt megvetéssel
rikácsoljon csak
a tarka papagájhad:
mit tudják ők,
hogy éjjelente
az ily egyszerű,
kis, szürke
madárnak
csodálatos dal
buggyan
a torkán!

AZ ISTEN KERTJÉBEN
En ĝardeno de l' Dio

Szerelmünk ma beteljesült csoda,
megnyílt előttünk az Isten völgye.
- Én akartam, és te is akartad -,
véget ért a vágyak gyötrő böjtje.

Az Isten kertjében járunk titkon
gyönyört szomjazva, félig részegen;
fogjuk egymást ijedt öleléssel,
halk csodálattal, némán, félszegen.

Egy eltévedt reszkető fénysugár
hajad aranyló, dús selymére hull;
hamvas tested szép hófehér szobor,
min a szemérem halvány pírja gyúl.
S bőrünk sejtelmes érintésétől
kipattan az új titok remegve;
fulladozunk meztelen csókok közt
felszabadultan, megrészegülve.

Az Isten csodás kertjében járunk,
hol kusza, lázas árnyak intenek,
hol egy titkos hang felénk kiáltja:
Legyetek most egy percre istenek!...

FÉLÚTON
Duonvoje

Egyszerű gondok szürke úti-köpenyében
félúton járok
a lét feszülő boltíve alatt,
s félig elnyűttem már
a lélek kölcsönbevett vázát -
a semmiből-születőt és semmibe porlót...
Nem tudom,
támad-e visszhangja kongó lépteimnek-
s nem állhatok meg félúton
a moccanó időben,
mert előrelöknek sürgetőn
türelmetlen napjai
mögém toluló éveimnek...

KÉT VÉLEMÉNY
Du opinioj

Nem akart utódot
- és nem ő az első.
Azt mondta:
Vétek gyermeket szülni
akkor, ha bizonytalan
az emberiség léte.
Sorsunk palackjába zárva
nukleáris rém ül,
s az üveg vékony...
Ki tudja, mikor érinti
a gyűlölködés ujja?

Azt mondtuk:
aki hitét vesztve
az utókort nem vállalja,
gyilkos az is -
a meg-nem-születettek gyilkosa!
- Egy emberöltő nem hosszú idő,
s meddő lesz minden csepp veríték,
és hiábavaló a vér...
A jövőt félteni: ahhoz hit kell,
és ember, akiben hiszünk
- hisz lemondva utódainkról
véget vetnénk
fegyver nélkül is az emberiségnek!
Gondold csak el:
ki vétkezik nagyobbat, ha téved...?

MÉG KEVÉS A FÉNY!
Malmulta estas ankoraŭ la lumo

Azt hittük,
köröttünk mindég fények lobognak majd.
Úgy jöttünk ide
zölddel habzó réteken keresztül,
az ég tintakékkel szikrázó kupolája alatt,
